

# NIA KRUCUMITA REĜO

*“...la potenco de Dio kaj la saĝeco de Dio.”*

Kiam Adam ribelis kontraŭ Dio per la malobeo de la ordono ne manĝi de unu speciala arbo, li interrompis la bonan rilaton, kiun li ĝis tiam ĝuis kun Dio. Per tiu ago li ja eksciis ‘bonon kaj malbonon’ kiel diris la serpento - la bonon de la rilato kun Dio, jam perdita, kaj la malbonon de kulpeco kaj timo kiun li tuj eksentis. Kiel posteuloj de Adam ni estas en la sama situacio, apartigitaj de Dio, meritante morton, senhelpaj kaj nekapablaj savi nin.

La rakonto en Genezo 3 ne indikas la tonon de voĉo per kiu Dio vokis Adamon: *“Kie vi estas?”* sed tio, kion ni poste lernas pri la karaktero de Dio - kompatema, amanta kaj indulgema - sugestus, ke la tono ne estis kolera; Dio sciis jam tion, kio okazos. Li donis al Adam kaj Eva la ŝancon konfesi ties pekon, kaj kiam ili konfesis, Dio pardonis ilin. Tamen estis konsekvencoj. Ili ne tuj mortis, sed ili estis forpelitaj el la ĝardeno kaj apartigitaj de Dio.

Tamen Dio havas celon por la homoj; li amas nin, tial li jam provizis vojon per kiu ni povas reveni al li, esti ‘repacigitaj’ kiel diris Paŭlo (Rom.5:8-10), per la vivo kaj morto de Kristo. La mesaĝo de Jesuo estis, ke iu, kiu kredos la evangelion kaj baptiĝos estos savita (Mk.16:16). Sed ne estas facile kompreni kial Dio elektis tiun vojon por savi nin. Kiel Paŭlo diris, la instruo, ke ni povas esti savitaj pro tio, ke la Mesio mortis sur la kruco estas *“por la pereantoj malsaĝeco; sed por ni, la savatoj, ĝi estas la potenco de Dio ... por Judoj falilo, kaj por Grekoj malsaĝo”* (1Kor.1:18-24).

Iusence tiu simpla mesaĝo estas ĉio, kion necesas, ke ni sciu. Jesuo diris, ke ni devas akcepti ĝin kiel malgrandaj infanoj. La pensoj de Dio ne similas al la niaj - kiel ni, nur homoj, povus kompreni kial li elektis tiun metodon savi nin? (Jes.55:8) Sed la Nova Testamento enhavas multajn klarigojn pri la kruco, la krucumado kaj la sango de Jesuo, (ĉiuj diversaj priskriboj de ties sindono) ke evidentiĝas, ke Dio volas, ke ni ekkomprenu. La krucumado de la Mesio estas tia konsternega, malegika ago, ke ni repuŝiĝas, hororigitaj; tamen Petro diris al la Judoj, ke tio okazis laŭ la *“... difinita intenco kaj antaŭscio de Dio ...”* (La Agoj 2:23) Kial? Ĉu ne estis iu alia vojo?

## Metaforoj

Gravas kompreni, ke la diversaj klarigoj pri la morto de Jesuo estas nur metaforoj, figuroj por helpi nin kompreni; ili ne estas plenaj aŭ precizaj en la detaloj, tial oni devas ne kompreni ilin laŭlitere. Plue oni povas miskompreni iujn el la vortoj pro tio, ke la originala greka lingvo estas malpli leĝema ol la latina en kiun oni ĝin tradukis. Tiu latina traduko tiam influis la tradukadon en diversaj aliaj lingvoj. Tio povas kaŭzi miskomprenon de la originala signifo.

Johano la baptisto prezentis Jesuon al la popolo kiel *“... la Ŝafido de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo!”* (Jn.1:29) Tio tuj kondukas nin al la Mosea Leĝo en kiu oni buĉoferis ŝafidojn pro pekoj, precipe dum la festo de Pasko (El.12), kaj tiu figuro de Kristo kiel buĉfero estas

konsista temo tra la Nova Testamento. Ekzemple Paŭlo tiel nomas lin “... *por ni ankaŭ Pasko estas oferita, nome Kristo ...*” (1Kor.5:7) Tio instruas nin tion, kion Dio intencis instrui al la Izraelidoj: ke la morto de la ŝafido (Kristo) estas tio, kion ni mem meritas. Tio ne signifas, ke Kristo mortis anstataŭ nin - ni ĉiuj fine mortos. Li estis mortigita pro ni; se ni ne estis pekantoj ne necesus, ke Jesuo mortus.

Sub la Mosea leĝo la buĉferoj ne fakte forprenis la pekojn de la popolo; tio estas klarigita en Hebreoj 9 kaj 10. La oferanto estis pardonita sed li daŭris peki, do li devas oferi denove kaj denove. La ofero de Kristo estas pli bone ĉar per tio ni ricevas por ĉiam pardonon sen la bezono fari pluan oferon. Sed denove, estas malfacile kompreni kial Dio elektis tiun metodon. David montris profundan spiritan komprenon pri la rolo de la oferoj, kiu helpas nin kompreni: li komprenis, ke Dio ne fakte volas buĉferojn de bestoj; li volas “*Koron suferantan kaj humilan ...*” (Ps.51:16-17) Eĉ pli klare en Psalmo 50:7-15; estas evidente, ke Dio ne manĝas la bestojn kaj neniu povas doni ilin al Dio ĉar ili ĉiuj jam apartenas al li. Tial ŝajnas klare, ke la intenco de tiuj oferoj en la Malnova Testamento estis instrui al la poplo, ke pekado estas al Dio abomena kaj, ke oni devas fari ion por pritrakti ĝin. Krom se la oferanto sincere agnoskas kaj pentas pro sia peko, la ofero nek efikas nek estas akceptebla. Tio estis la situacio eĉ antaŭ la Mosea leĝo: Dio ne akceptis la oferon de Kain ĉar li ne donis ĝin en la ĝusta spirito de fido kiel Habel (Heb.11:4).

### **Peko estas serioza**

En tiu kunteksto ni povas ekkompreni, ke la intenco de la kruco estas instrui nin por ke ni agnosku, ke la peko estas serioza afero kaj, ke necesas fari ion pri ĝi. Peko apartigas nin de Dio kaj pro tio ke li amas nin li deziras, ke ni reiru al li - ke ni pentu. Paŭlo diris, ke la ofero de la Mesio ‘repacigas’ nin kun Dio (Rom.5:10). Repacigo signifas la rekunigiton de du uloj, kaj ni scias, ke Dio mem jam deziras tion: “... *Dio tiel amis la mondon, ke li donis sian solenaskitan filon ...*” (Jn.3:16) Estas ni, kiu devas esti repacigitaj: “... *Dio estas en Kristo, repaciganta la mondon al si, ne kalkulante al ili la kulpojn ...*” (2Kor.5:18-19)

Alia vorto, kiun la Biblio uzas por helpi nin kompreni tion, kion la morto de Jesuo faris por ni estas ‘elaĉeto’. En la Mosea leĝo oni povus liberigi kaptitulon per pago de monsumo, kaj en la Nova Testamento Petro skribis, ke ni estas savitaj “... *ne per ... oro aŭ arĝento ... vi elaĉetiĝis ... per multekosta sango... la sango de Kristo ...*” (1Pet.1:18-19) Homoj emas miskompreni tion kvazaŭ Dio postulas pagon pro niaj pekoj kaj, ke la pago estas Jesuo, kiu mortis anstataŭ nin. Sed ni devas memori, ke ĉi tiu ekzemplo estas metaforo; la efiko de tiu elaĉeto de monsumo en la leĝo estis liberigi la kaptitulon; simile la sango de Kristo liberigas nin. Alivorte por savi nin de niaj pekoj Jesuo ‘pagis’ per sia vivo. Li ne mortis anstataŭ nin ĉar ni ĉiuj mortas; li ne laŭlitere ‘pagis’ ion -

neniu ricevis lian vivon - li volante donis ĝin (1Pet.1:18-19; Jn.10:18). Gravas, ke ni ekkomprenu, ke la intenco de la diversaj metaforoj ne estas kiel klarigoj de la ‘mekanikoj’ de la metodo, per kiu Dio savas nin; ili montras diversajn aspektojn de la afero.

La vortoj ‘repacigo’ (Rom.3:25,5:11; 1Jn.2:2, 4:10) kaj ‘fermoplato’ (Heb.9:5) estas tradukoj de la sama, aŭ rilata Greka vorto. En la Malnova Testamento la ‘fermoplato’ estis la ora kovrilo de la kesto en la Plejsanktejo de la tabernaklo kien la ĉefpastro iris unufoje en la jaro, je la tago de pekliberigo, por ricevi pardonon pro la pektoj de la Izraelidoj (El.25). Tiel ni povas kompreni, ke por ni Jesuo estas nia ‘fermoplato’, nia loko de pardonon, al kiu ni povas veni por ricevi pardonon.

### **Fido - nia parto**

Nia parto en ĉi tiu dependas de nia fido. Ni mem ne povas fari ion ajn por esti pravigitaj krom fidante en Kristo, *“kiun Dio antaŭdifinis kiel repacigilon per fido en lia sango ...”* (Rom.3:21-26) Denove evidentiĝas, ke nepre necesas ke niaj koroj estu sincere pentemaj; fido signifas, ke ni vere kredas. Jesuo sin komparis al la kupra serpento sur la stango: nur tiuj, kiuj kredis tion, kion Dio diris ekrigardis ĝin kaj saviĝis de la mordo de la serpentoj (Nom.21:4-9; Jn.3:14). Estas en tiu senco, ke Jesuo estas nia interulo: *“... neniu venas al la Patro krom per mi.”* (Jn.14:6) Jesuo ne persvadas Dion aŭskulti niajn preĝojn - Dio jam scias tion, pro kio ni intencas preĝi - li volas persvadi nin ekkredi kaj reveni al Dio (Jn.16:26-27).

Eble tio komencas alproksimigi nin al kompreno kial Dio elektis la krucon kiel nia savilo. Jesuo instruis per paraboloj kaj klarigis ilin nur al tiuj, kiuj venis por demandi. Simile ni povas aŭ ignori la krucon kiel ofenda aŭ malsaĝa, aŭ ni povas strebi kompreni. La spektaklo de la sola senpeka homo, kiu iam ekzistis permesante maliculojn murdi lin en tia brutala maniero, estas intencita efiki nin. Li diris, ke lia morto sur la kruco *“... altiros al mi ĉiujn homojn.”* (Jn.12:32) kaj Petro klare diris, ke ekzistas neniu alia vojo per kiu ni estu savitaj krom per la nomo de Jesuo, la Mesio. (Ag.4:12) La intenco de la kruco estas have ian efikon al la homoj.

Povas esti, ke ‘Kial?’ estas malĝusta demando. Dio ne ofte respondas al tia demando: kaj Ijob kaj Ĥabakuk volis ekscii kial Dio ion faras, kaj kvankam la respondo de Dio kontentigis ilin, li neniam fakte respondis al la demando. Ili nur lernis rigardi la problemon de alia perspektivo. Se la morto de la Mesio pro pekantoj montras la amon de Dio por ni kaj efikas nian pardonon (Rom.5:8), ne eblas, ke ni senplue akceptus tian pardonon. Pli ol tio: se ni staras ĉe la piedo de la kruco ni rimarkas, ke Jesuo ne montris ian koleron aŭ indignon pro tia krueleco, tute male: li montris zorgon por aliuloj (1Pet.2:21-24), lasante al ni ekzemplon por ke ni *“sekvu liajn postesignojn ..”*

Por esti vere repacigitaj per la morto de la Mesio ni devas resti fidelaj (Kol.1:21-23); ĉiu el ni devas mem preni sian krucon (Mt.10:38; 16:24; Lk.14:27). La Biblio uzas la vorton 'Kruco' por preskribi la vivon, morton kaj releviĝon de Jesuo; lia morto sole ne estas la tuto. Sen la ekzemplo de lia vivmaniero kaj la releviĝo, per kiu Dio montris, ke Jesuo plaĉas al li, ni havus nenian esperon; per lia releviĝo ni estas savitaj.

### **Neniu alia vojo**

Tra la historio Dio uzis diversajn metodojn por persvadi la homojn reveni al li (Heb.1:1). Li parolis rekte al la Izraelidoj ĉe la monto Sinaj, kie ili fakte aŭdis lian voĉon parolante el la fajro, mallumo kaj trumpeta sono (Heb.12:18-21), sed ili forkuris, petante, ke Moseo donu al ili la mesaĝon. Li sendis multajn profetojn por doni al ili lian mesaĝon, sed ili rifuzis aŭskulti. Li ordonis profetojn kiel Hoŝea kaj Jeĥezkel aktumi lian mesaĝon por averti ilin, sed denove ili malatentis. Fine do, havante neniun alian sendi, li sendis sian amatan filon (Mk.12:6). Sekvas nur la konkludo, ke vere ne estis alia vojo per kiu Dio povas nin savi. Ne plu Dio al ni parolas per timega voĉo, ventego, fajro, tertremo aŭ tondro, sed per *"delika venteto"* al niaj koroj (1Reĝ.19:11-12). Rigardante la Sinjoro Jesuo plorante super Jerusalemo ĉar la popolo ne permesis al li savi ilin; la Filo de Dio luktante venki sian homan naturon en Getsemane kaj montrante kompaton por aliuloj dum la hororoj de torturo sur la kruco – la intenco de tiuj aferoj estas tuŝi niajn korojn. Krom se ili kortuŝas nin, por ni li vane mortis. Se niaj koroj ja respondas ni povos *"... kompreni kio estas la largeco kaj longeco kaj alteco kaj profundeco, kaj scii la amon de Kristo ... por ke vi pleniĝu eĉ ĝis la pleneco de Dio."* (Efes.3:18-19)

### **La forta homo**

La malsukceso de Adam verŝajne estis neevitebla. Li havis ĉian avantaĝon – perfekta vivloko, neniom da forta laboro, nenio da doloro aŭ sufero, nenio da malamikoj – la sola manko por li estis sperto de la vivo. Nur unu leĝon Dio donis al li: 'Ne manĝu de tiu arbo', sed kiel ni ĉiuj konas, precipe pro nia sperto en infaneco, io malpermesata tuj fariĝas eĉ pli dezirinda. Nur forta persono kapablas rezisti, kaj Jesuo estis tiu forta homo, kiun Dio celis de la komenco. Jesuo bezonis la scion de vivante inter aliaj homoj, rigardante tion, kion ili faras kaj diras. Tio ne signifas, ke estis por li pli facila rezisti la tenton – tute male. Pro tio, ke Dio jam donis al li la Sanktan Spiriton kaj liberan volon, la tento estis por li eĉ pli forta ĉar li povis rezisti la planon, kiun Dio havis por li: li povis elekti ĉu aŭ ne permesi al la Judoj kaj Romanoj krucumi lin. Tamen Jesuo havis la sperton, kiu al Adam mankis, kiu donis al li pli vastan perspektivon kaj pli profundan komprenon.

Estis egale neevitebla, ke malbonuloj volus detrui tiun bonan homon. Same kiel Kain murdis Habelon ĉar ties agoj estis bonaj dum tiuj de Kain estis malbonaj (1Jn.3:12; Jn.8:40), homoj murdis Jesuon pro tio, ke lia boneco montris ilin pekantoj – kaj ĉiu el ni apartenas al tiu grupo ĉar ni ĉiuj

pekas (Rom.3:23). Evidente ni ne kriis “Krucumu!” sed ni partoprenas la kulpecon ĉar tia estas la homa naturo – ni kapablas fari eĉ tion en tiaj cirkonstancoj. Rigardante la senpekan filon de Dio suferante torturon sur la kruco devas ŝoki nin tiel, ke ni agnoskas, ke estas peko kiu tion faras. Tamen Dio kaj Jesuo faris tion por ni ĉar ili nin amas.

### **La pli granda amo**

Jesuo diris: *“Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj.”* (Jn.15:13) Oni povus diri, ke la amo de Dio mem fakte estas pli granda ol la amo de iu homo, inkluzivante Jesuon, ĉar estas pli malfacila permesi amatan filon suferi ol mem suferi; ĉi iu gepatro scias tion. Jesuo estas la sola homo, kiu iam estis precize tia, kian Dio volas – ne mire, ke Dio nomis lin ‘amata’, sed li permesis lian morton pro ni. Jen tiom Dio nin amas!

### **Nia respondo**

Kiel do ni respondu al ĉi tiu? En Getsemane Jesuo, frontante la afliktegon venontan, tre malĝojiĝis, ne pro la doloro kaj malhonoro tiel klare priskribita en Jes. 53, sed pro malĝojo. Lia deziro estis kolekti la homojn *“kiel kokino kolektas sian idaron sub la flugilojn ...”* (Mt.23:37) Por tiuj, kiuj malakceptas lin li vane mortis. Ne estu tia por ni! Ne estas verŝajne, ke ni suferos krucumon por nia fido al li, kvankam iuj ja estis murditaj por sia lojaleco al li, sed se ni restos fidelaj al li kiom ajn la kosto, ni estos vere liaj geamikoj. Jesuo diris, ke per sia morto sur la kruco – tute publika afero kiun neniu povus kontraŭdiri – li altiros al si ĉiujn homojn (Jn.12:32). Sed mortinta Mesio apenaŭ tion farus. La glora fakto de lia releviĝo, la centro de Kristanismo, estas la vera allogo. Per la revivigo de Jesuo, Dio montris sian ĝojon pro li, kaj per nia fido ankaŭ ni ĝojigas Dion.

Partoprenante la panon kaj vinon ni memorigas la oferon de nia Reĝo, kiu donis sian vivon por savi nin kaj revenigi nin al Dio.

Jean Field